

La heroo vivo de Henri Dunant, 13-a parto  
Claude Gacond, 108-a radioprelego, 1964.12.23 & 26

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la dektrian elsendon pri tiu temo.

La 26-an de oktobro 1863 malfermiĝas en Ĝenevo tiu fama Kongreso, por kiu Henri Dunant tiom obstine kaj ruze varbis oficialajn delegitojn. Gustave Moynier ĉion pretigis ĝis en la plej etaj detaloj kaj Henri Dunant ricevas la taskon organizi festojn.

Partoprenas 36 delegitoj, el kiuj 18 estas oficialaj reprezentantoj de 14 registaroj. Generalo Dufour havas la honoron prononci la malferman paroladon. Kun nuancoj kaj moderemo la maljunulo trudas al la kunsidoj alt-rangan gravecon. Moynier prezidas. Dunant protokolas. Tiel, iom post iom la principoj de la Konkordato estas akceptitaj de ĉiuj, same kiel la flago kaj la nomo de la organizaĵo, Ruĝa Kruco sur blanka fono. Sed ĉio ne povas kontentigi Dunant, kiu sentas, ke la prezidanto Meynier provas lin elimini el la honoroj. La kuracisto Basting malkovras la malsimpation, kiu regas inter ambaŭ ĝenevanoj, li intervenas vane por savi la tezojn pri la neŭtraleco de la Ruĝa Kruco kaj pli sukcese por rememorigi la laboron de la aŭtoro de *Rememoro pri Solferino*.

De nun la duelo Moynier-Dunant akriĝos. La prezidanto de la Ĝeneva Konferenco profitas sian pozicion por falsigi la priskribon de la fondiĝo de la Ruĝa Kruco. Henri Dunant devas peti al la gazetoj reĝustigojn. Li ŝajnas malhumila.

Tamen la kvin komisianoj de la Ĝeneva Komitato devas regule renkontiĝi por pretigi novan Kongreson, kies tasko estos la ratifo fare de plej multe da registaroj de la Rezolucioj ĵus akceptitaj de la Ĝeneva Konferenco. Henri Dunant rekomencas siajn varbajn vojaĝojn tra Eŭropo. Li fondas en multaj urboj komitatojn de sanitaraj sukuristoj. Li ĉefe diskonigas sian ideon pri neŭtraligo de la Ruĝa Kruco.

Henri Dunant sin montras talenta diplomato, kiu kapablas akceptigi al la franca registaro la oficialan patronadon de la Ĝeneva Kongreso. La svisa registaro sendas la invitojn al la ŝtatoj, por ke ili sendu delegitojn kapablajn ratifi la Rezoluciojn de Ĝenevo en ilia nomo.

Aŭgusto 1864 rapide alvenas. Moynier nun definitive eliminis Dunant el la oficiala vivo de la Ruĝa Kruco. Jen kiel li disdonas la funkciojn: al generalo Dufour la prezidadon de la Konferenco, al si mem kaj al delegito de la svisa registaro la vicprezidantecojn. Al alia svisa delegito la sekretariaton. Dunant, Appia kaj Maunoir kontentiĝu rigardi la okazaĵojn aŭ rikolti la paperaĵojn post la kunsidoj, kiel obeemaj helpantoj. Al Henri Dunant doloras la koro. Li tiel forte identiĝis kun la Ruĝa Kruco. Nun la realeco sin trudas kiel glavo pereiga.

24 delegitoj reprezentas 16 registarojn. Inter la severaj kunsidoj en la Urbodomo ili admiras la ĝenevan pejzaĝon per belaj promenadoj sur la lago aŭ bankedaj renkontiĝoj en la parko La Grange aŭ la bienoj de la riĉaj bankistoj Moynier, Bartholony kaj Vernes, kies domoj apudas la lagon. Henri Dunant provas forgesi sian ĉagrenon estrante la mondumaĵojn kaj dancante kun belaj aristokratinoj.

Malgraŭ multaj forigoj kaj dank'al multaj aldonoj la Ĝeneva Konvencio formiĝas. La jura stilo de Moynier efikas, la precizigoj de la francoj poluras la paragrafojn, kaj la 22-an de aŭgusto 1864 oficiale naskiĝas la Ruĝa Kruco. Nova Utopio fariĝis realaĵo. Sed sammomente Henri Dunant, ĝia iniciatinto, perdas sian vivocelon. Ekde 1859 li dediĉis ĉiujn siajn fortojn, ĉiujn siajn pensojn kaj ĉiujn siajn riĉaĵojn nur al la efektiviĝo de tiu utopio. Nun li sentas sin elĉerpita. Se almenaŭ iu rememorus lian nomon, lian verkon *Rememoro pri Solferino*, lian sindonon. Sed Gustave Moynier regas. Li estas la kreanto de la Ruĝa Kruco. Tiu Dunant foriru, same kiel la tri aliaj komisianoj de la Ĝeneva Komitato. Kaj li uzas novajn rimedojn por forgesigi la rolon de Henri Dunant. Li diskonigas suspekton rilate al li. Sekretaj aludoj ripete flustrataj efikas por malhonorigi la konkuranton.

La heroa vivo de Henri Dunant, 13-a parto  
Claude Gacond, 108-a radioprelego, 1964.12.23 & 26

Henri Dunant devas sin defendi sur du frontoj. En Alĝerio la muelejoj Mons-Djemila malbone fartas kaj minacas bankrotiĝon kaj la mensogoj minacas lian intimecon.

Malgraŭ tiuj teruraj cirkonstancoj, aŭ eble por ilin forgesi dum momentoj, Henri Dunant dediĉas grandan parton de sia tempo al la fondo de naciaj kaj regionaj branĉoj de la Ruĝa Kruco. Li ankaŭ ludas rolon inter la unuaj sionistoj akirante de la otomana registaro sesdek mil hektaran koncesion en la regiono de Nazareth por venigi tien judajn familiojn. 14 elmigrintoj el Vurtembergo skribas al li post sia alveno en Nazareth: *“Vi estas anĝelo antaŭvidita de la profetoj.”*

Sed tiuj belaj revoj pri la bibliaj profetaĵoj hereditaj de la infaneco ne helpas la financiston en la reala vivo. Dum la minacoj akriĝas, li ankoraŭ trovas ĝojon akceptante inviton de la prusa reĝo, kiu ĵus venkis super la aŭstria imperiestro kaj volas pruvi sian homamon honorante Henri Dunant, kiu en liaj okuloj estas ankoraŭ la kreinto de la Ruĝa Kruco.

Kiam Henri Dunant revenas Ĝenevon komence de 1867, tiam la tribunalo lin kondamnas. Civila kondamno, kaj ne krima kondamno, kiel emos ripeti liaj malamikoj. Lia familio provas lin helpi. Sed la ŝuldoj estas tro grandaj.

La 25-an de aŭgusto 1867 Henri Dunant devas sendi sian demision el la funkcio de sekretario de la Ĝeneva Komitato. Moynier profitas tiun eventon por definitive forgesigi la nomon de Henri Dunant. Li priskribas la originojn de la Ruĝa Kruco sen citi la libron ***Rememoro pri Solferino*** kaj menciante nur unufoje la nomon Henri Dunant.

Ni multobligos la tekstaron de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-